

# EKO 2025

Bleko  
kun eĥo

EKO 2025-05. Januaro 31. Alkroĉaĵoj: Raporto de ILEI. SI Pezo xxx KB

## La Tago de Edukado – grava por UEA

Jen mesaĝo sendita de UEA al UN kun peto republikigi ĝin en viaj lokaj kaj landaj gazetoj. La mesaĝo disponeblas en la [angla](#) kaj [franca](#) en la retejo <https://esperantoporun.org>. La Afiŝo disponeblas [Esperante](#), [angle](#) kaj [france](#).

Edukado, homaj rajtoj kaj lingva justeco. Okaze de la Internacia Tago de Edukado, ni atentigas pri la fortaj ligoj inter tiuj tri aferoj. Edukiĝo estas homa rajto: la 26-a artikolo de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj asertas, ke elementa edukado estu senpaga kaj deviga, kaj ke 'teknika kaj porprofesia edukado estu ĝenerale akirebla por ĉiuj. Per edukado oni gajnas la kapablon kompreni, postuli kaj ĝui la aliajn homajn rajtojn. Edukado okazas pere de lingvoj: oni devas scipovi difinitan lingvon por edukiĝi per ĝi. Leviĝas fundamenta demando: per kiuj lingvoj infanoj lernu? Lernado, precipe je baza nivelo, okazu per la denaska lingvo de la lernanto, aŭ la lernanto laŭrajte ricevu la rimedojn necesajn por atingi plenan komprenon de la instrulingvo.



## Komercaj aktivaĵoj tra Afriko kaj Azio

Sukcesaj aperoj de IKEF okazis en 2024 en la 109-a UK en Tanzanio, la 3-a KK en Koreio kaj la 2-a Komuna Seminario en Koreio. Nun IKEF ekvarbas por la 6-a Speciala Ekskurso 2025 en Nepalo. Pliaj informoj skribu al IKEF-Turismo ([790862338@qq.com](mailto:790862338@qq.com)).

Ĉielismo WANG Tianyi. Prezidanto de IKEF, <http://ikef.info>

## ILEI fidele raportas – kiel ĉiam

Raportas la Prezidanto kaj la Estraro de ILEI pri trimonata agado, de oktobro 2024 ĝis januaro 2025. Ŝlosilpunktoj: 75-jariĝo de ILEI: festaj eventoj; ILEI-kongresoj 2025 kaj ontaj; Instruista trejnado en Burundo; novaj projektoj de ILEIL Instruistoj de la Jaro; ILEI dum la Virtuala Kpngreso; EKO disponeblas ĉe la paĝaro de ILEI; Tago de Esperanta Libro; Premio La Torre; universitata agado; IPR kaj JA; kunlaboro kun UEA, Ĉina Radio kaj la fremdlingva asocio FIPLV. EKO alkroĉas la raporto[n] (27- KB) //alk: **6agha sub T.**

## Nova gvidantaro en Pakistano

Jen la estraro de Pakistana Esperanto-Asocio ĝis 2026. Prezidanto: Abid Ali Qureshim, Ĉef-vicprezidanto: Ashfaq Ahmad Bhutta; Vic-prez.: Ali Muhammad Dar Kheber Asad Shah, Sind: Allah Rakheo; Ĝen. Sekr.: Jawaid Eahsan; Kasisto: M. Jamshed Ajmal

Jawaid Eahsan/Pakistano. [saluton123@esperanto.org](mailto:saluton123@esperanto.org)



## La kato rigardas al timiga katastrofo

La risko de forfaligo de la ekzameneblo en Hungario ne nur timigas la sekciestron Josefo Német sed eĉ konsternas lian katon (unu el multaj).

## Interlingvistoj servataj en Esperanto

Nun haveblas la numero 130 de Informilo por Interlingvistoj (Ipl): Ipl - kaj ĝia anglalingva versio, Ipl - estas eldonataj de la [Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj \(CED\)](#). Niaj novaĵleteroj disponigas informojn kaj ĝisdatigojn pri interlingvistiko kaj lingvoplanado, kun detaloj pri eventoj kaj novaj publikaĵoj, raportoj pri lastatempaj konferencoj, kaj aliaj utilaj informoj por esploristoj kaj ĉiu, kiu interesiĝas pri lingvopolitiko, Esperantologio kaj rilataj temoj. Trovu ĝin ĉe:

<https://interlingvistiko.net/wp-content/uploads/2025/01/Ipl130.pdf>

## Amasoj por Massa

Voĉdonu por la Nacia Biblioteko de Esperanto en Massa en la "I Luoghi del Cuore" Cenzo de FAI! La Nacia Biblioteko de Esperanto en Massa estas loko de granda kultura kaj historia valoro, ĉefa centro por ĉiuj pasiuloj de la internacia lingvo kaj ĝia literaturo. Situantita en la bela urbo Massa, ĉi tiu biblioteko konservas unu el la plej riĉaj kolektoj de Esperanto-verkoj en la mondo. Ĉi-jare la **Fondo Ambiente Italiano (FAI)** lanĉas sian cenzon, kie ĉiu povas voĉdoni por lokoj, kiujn ili volas konigi kaj konservi. **La Nacia Biblioteko de Esperanto en Massa** meritas videblecon!

La cenzo estas malfermita al ĉiuj, inkluzive de eksterlandaj partoprenantoj. Voĉdoni estas simple kaj senpage! Vi havas tempon ĝis la **10-a de aprilo 2025** por partopreni. **Por voĉdoni, vizitu la retejon de FAI kaj serĉu la Nacian Bibliotekon de Esperanto en Massa:** <https://fondoambiente.it/luoghi/biblioteca-nazionale-di-esperanto?ldc>

Laura Brazzabeni, Italio

## Reta seminario de la Eŭropa Centro por Modernaj Lingvoj

Eŭropa Centro por Modernaj Lingvoj (ECML) de la Konsilio de Eŭropo, organizas retan seminarion (fr+en) pri «Défis et opportunités de l'éducation plurilingue et interculturelle dans le contexte de l'irruption de l'intelligence artificielle»

"Opportunities and challenges for plurilingual and intercultural education in times of AI"  
<https://www.ecml.at/Resources/Webinars/tabid/5456/language/fr-FR/Default.aspx>

Do en rilato kun la temo de nia kongreso en Beogrado. Videbla marde la 4-an de februaro, 16:00 (UTK+1)

Didiers Janot

## Aŭtomataj Tradukiloj

Diplomlaboraĵo de Vitor Tagor de Magalhaes Monteiro pri maŝintradukado, artefarita intelekto, neŭrona reto. Amplekso: 52 paĝoj. La celo de ĉi tiu esplorado estis studi la ekzistantajn aŭtomatajn tradukilojn kaj serĉi eblojn por malaltigi la kostojn de tradukado de teknikaj dokumentoj. Oni esploris la ŝanĝojn en la postuloj, kiuj okazis en la fako de tradukado kaj studis kiaj tradukmodeloj ekzistas kaj kiel ili funkcias.

**Trovu ĝin en Scienca kaj Teknika Esperanto-Biblioteko, STEB, ĉe:**

[http://www.eventoj.hu/steb/ingxenierado/komputado/auxtomataj\\_tradukiloj.pdf](http://www.eventoj.hu/steb/ingxenierado/komputado/auxtomataj_tradukiloj.pdf)

- kaj ankaŭ en la katalogo de <[edukado.net](http://www.edukado.net)>

## IKEF ducente

La 19-an de januaro okazis la jubilea aranĝo por la 200-a Dimanĉa Kunveno de nia komerca faka asocio. De longe oni konscias ke uzo de Eo por internaciaj komerco kaj ekonomio estas tre grava por valorigi Esperanton, sed ne konscias ke la internacia komerco postulas profesion nivelon de la lingvo, kaj ne konscias ke posedi la profesion nivelon de la lingvo bezonas longan praktikadon je la parolo kaj aŭdo. Kion fari? Danke al lastjare nova tekniko de la interreta video-kunveno IKEF kun komercista akrosento kaj racia pacienco kaptis la avangardaĵon kaj trejnus IKEF-anojn.

## Slovena progreso

Bonvolu trafoliumi la alkroĉitan novan numeron de la bulteno *Informacije / Informoj* 2024/4 (decembro). Ĉiuj numeroj de la bulteno estas al dispono per la ligilo:

<http://www.esperanto.si/eo/bulteno-informacije-informoj-0>.

Ostoj KRISTAN, sekretario de SIEL

## Akademia horo

Mez-decembre 2024 okazis per Zoom Konferenco de la Akademio de Esperanto kun ok prelegoj de akademianoj. Legu prian artikolon de François Lo Jacomo en la novaĵretejo *La Ondo de Esperanto* <https://sezonoj.ru/2025/01/akademio-25/>

## Sukcesa informado en Hungario

La reklamkampanjo lanĉita en la 28-a de decembro alportis bonajn rezultojn.

**100 000** personoj reagis.

Lászlo Szilvasi



## Filmetoj el Ĉinio

Celante subtenon al popularigo de leĝo kaj disvastigon de Esperanto Ĉina Esperanto-Ligo (ĈEL) partoprenis en la aktiveco “Kolekto kaj Dissendo de Mallongaj Filmetoj de la ĉefurbo Pekino Interreta Leĝa edukado”. Liaoning-a Esperanto-kultura Klubo (LEKK) organizis membrojn kaj kursanojn voĉdoni por ĈEL. Finiĝis la voĉdonado en la 17-a de januaro 2025. La Ligo tute akiris 242 balotojn, i.a 19.83% da ili venis el LEKK.

Wu Guojiang, Prezidanto de Liaoning-a Esperanto-kultura Klubo (LEKK), Ĉinio

## Pledo por uzo de Unikodo

La Unikoda sistemo permesas la aperigon de tekstoj en Esperanto kun ĝustaspektaj supersignoj. Unikodo ekzistas jam de pli ol kvindek jaroj kaj estas facile akirebla:

- 1 Uzu daŭre litertipon kiu subtenas Unikodon. *Arial* kaj *Times New Roman* tion faras, plus deko da pliaj tipoj. Por EKO, mia korpa teksto estas ĉiam 12-punkta *Arial*, sufiĉe klara kaj granda por ke malfortvidantoj (kiel mi) povu legi ilin komforte.
- 2 Difinu en *Word* rapidklavojn por la supersignitaj literoj. Mi uzas *Alt* kun c,g,h,j,s kaj u. Tre facilas lerni efike tajpi per tiuj, kaj tio plezurigas la legantojn, kiuj ne devas lukti kontraŭ primitivaj malsolvoj per x kaj h.

Mi en la preparado de EKO-komunikoj perdas horojn solvante la ĝustan aperon de la supersignoj, kiam atendas aliaj farindaj taskoj. Do, mia pledo estas al la uzantoj de x kaj h : movu vin for de la dudeka jarcento: movu vin antaŭen 70 jarojn en la estonton.

Finfine Unikodo estas la Esperanto de skribsistemoj!

smg

## Rondtabla diskuto en Sarajevo

Esperanto-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino (ELBH) organizas sciencon kunvenon, Rondan Tablon, pri la temo Lingvo kaj Artefarita Intelektu kun la celo debati pri diversaj aspektoj kaj demandoj de lingva evoluo kaj tiurilataj aplikebloj de artefarita intelekto (AI). Al la Ronda Tablo estas invitataj esploristoj kaj fakuloj el la sferoj de lingvoscienco, edukaj sciencoj, komunikologio, sociaj sciencoj kaj priinformadikaj teknologioj interŝanĝi siajn spertojn kaj esplorojn partoprenante krome en sagacaj debatoj pri uzado de artefarita intelekto en esplorado de lingvo, en didaktiko, pri influo de maŝina tradukado al lingvo, ties etika uzado, postredaktado ktp.

La Ronda Tablo okazos la 20-21-an de februaro 2025 en Sarajevo. En ĝi partoprenos invititaj kaj aliĝintaj ekspertoj kaj interesiĝantoj el Bosnio kaj eksterlando. Laborlingvoj de la kunveno estos la bosna/serba/kroata kaj Esperanto. Aŭspicianto de la Ronda Tablo estas la Federacia Ministerio pri Edukado kaj Scienco. Por pliaj detaloj, dezirinda kunlaboro, aliĝebloj bonvolu kontakti: ELBH, Kralja Tvrtka 19, BA-71000 Sarajevo, Bosnio aŭ rete: [info@esperanto.ba](mailto:info@esperanto.ba)

ELBH kaj Gradimir Kraĝić

## Scienco elstarigata plurloke, plurfoje

Scienca agado en Esperantujo estis traktita en prelego kaj diskuto kadre de la IKEF-dimanĉa kunveno. Ni trarigardis la lastatempan sciencon agadon - la sciencajn programojn dum la UK kaj VK de 2024 (la januara n-ro de Esperanto kaj rete spektebla ĝis la jarfino en <https://vk.retevent.com/>) kaj planoj por kunvenoj kaj evoluo, kiel la en la NR kaj Luminesk, SUS-41 en BET, la IKU-AIS sesio en Burno, SUS-42 dum la Itala Kongreso. Sub diskuto estos la revivigo de ISAE.

Laŭ informoj de Amri Wandel

===== vortoj: 985 =====

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek (NL), Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE)



La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <https://www.ilei.info/agado/EKO.php>

## La kvardek kvar numeroj de 2024 nun aperas tie, kune kun la kolekto el 2023

**ALDONU AŬ SUBTRAHU VIN:** Skribu al <stefan.macgill@ce>gmail.com>. Por forigo, laŭeble informu min al kiu ekspedo-grupo vi apartenas. Mi povas forigi nur personojn kies retadreso estas individue enskribitaj. Ne eblas forigi homojn, kiuj ricevas la komunikojn pere de retlisto.